

Ivan Blatný

KANTADO

Tute proksime ĉe mi, ĉi tie en ĉi ĉambro
la onklo Jozefo lernas Esperanton kaj tintas sur gitaro,
nur etan peceton de ĉi tie, tute proksime ĉe mi, en la kvara dimensio,
tute proksime ĉe mi kaj per unu piedo
kaj per unu piedo preskaŭ en la tria
tute proksime ĉe mi li flustras: Mi estas esperantisto! Parolu esperante, Ivano! Ivano!
Vi ĉiuj estas en ĉi loĝejo.
Tute proksime ĉe mi la morta kolportisto el la pruntejo de bildgazetoj apertas nun la pordon.
Tute proksime ĉe mi la avino abonas la bildgazeton.
Okazis la unuan tagon. Ĝus estis ĝi antaŭpagita. Tute proksime ĉe mi.
Vi ĉiuj estas en ĉi loĝejo.
La morta muzika komponisto, kiun ŝi amis, ridetas el nigra kadreto.
Tute proksime ĉe mi la morto senĉese prezenca falĉas la komponistojn.
Tute proksime ĉe mi la esperantistoj foriras amase en 1a regionon transtomban. . .

Vi ĉiuj estas en ĉi loĝejo.
La onklo Jozefo sin defendas: Mi estas esperantisto!
Tute proksime ĉe mi la morto montras silente al la pordo.
Kaj la onklo Jozefo foriras heziteme en manĝejon, tute proksime ĉe mi.
Tute proksime ĉe mi li descendas la ŝtuparon.
Vi ĉiuj estas en ĉi loĝejo.
Mi petas vin, igu jam foje ripari tiun antikvan singraĵon!
Ekflustros iu ie tute proksime ĉe mi.
Tute proksime ĉe mi.
Vi ĉiuj estas en ĉi loĝejo.
Estis ĝi nome rondforma kudromaŝino, sed de pli aĝa tipo.
Ni ĉiuj estas en ĉi loĝejo.
Nur la onklo Jozefo ĵus eliris en la korton.